

86 = 3

MIKAELO DE CERVANTES SAAVEDRA

LA GENIA KAVALIRO DON-KIĤOTO DE MANĈUJO



(UNUA PARTO)

★ PONTEVEDRA
ESPERANTO-KLUBO

ĈAPITRO XXII^A

PRI LA LIBERO, KIUN DON-KIĤOTO DONIS AL MULTAJ
MALFELIĈULOJ, KIUJN ONI MALVOLONTE PORTIS, KIEN ILI
NE VOLUS IRI

★
TRADUKITA EN LA INTERNACIA LINGVO **ESPERANTO**
EL LA HISPANLINGVA ORIGINALO
DE **ESPERANTO**
LUIZ HERNANDEZ

★
PONTEVEDRA DELEGITO
DE LA HISPANA FEDERACIO
Eldono de Hispana Esperanto-Federacio

0700

ESPERANTO

HELPA LINGVO INTERNACIA

PONTEVEDRA DE LEGITO

ERACIO

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPAÑA ESPERANTO FEDERACIO



REPRESO DE LA TUTA ĈAPITRO, AŬ APARTA
FRAGMENTO, ESTAS PERMESATA SE ONI MENCIAS
LA NOMON KAJ ADRESON DE LA TRADUKINTO.

8078

00570700

ANTAŬPAROLO

Tute certe, «Don-Kiĥoto» estas la hispanlingva verko, kiun oni tradukis pli multnombro en fremdajn lingvojn. Tio aspektas tre nature, se oni konsideras, ke temas ne nur pri ĉefa juvelo de la hispana literaturo, sed ankaŭ pri impona monumento de la tutmonda kulturo. Nepre, ĉiu homo, el kiu ajn raso aŭ nacio, jen apartenas al la kategorio de Don-Kiĥoto, jen al la speco de Sanĉo... tial oni ne eraras se oni asertas, ke ĉiu fervora esperantisto akceptas tre plaĉe la alnomon je Don-Kiĥoto, kiu, eĉ kiam dirita en ridindiga senco, taŭgas paradokse por idealigi, ankoraŭ pli, la ideon pri lingvo internacia. Kredeble, pro tio, ĉiu hispana esperantisto, pli ol unu fojon en sia vivo, revas kaj revadas entrepreni la tradukadon de la majstra verko. Kelkaj manuskriptoj kaj diversaj presitaj kajeroj, kun la esperanta teksto de apartaj kaj disaj ĉapitroj, en forgesitaj ŝrankoj de arkivoj kaj bibliotekoj, atestas pri la fakto, ke atentinda nombro da kompetentaj samideanoj, dum la daŭro de la kuranta jarcento, provis efektiviĝi tiun sian revon kun la firma konvinko, ke plej en nia lingvo decas sin montri la supernobla figuro de nia brava heroo. Mi ne estis escepto en la dolĉa revado; ankaŭ ne mi povis eviti la tenton —naŭ jarojn antaŭe— preni plumon kaj, kvazaŭ lude, komenci vesti per esperantaj vortoj tiun treege konatan komencon: «En vilaĝo de Manĉujo, pri kies nomo mi ne volas memori...», kiu estas parkeraĵo en Hispanio eĉ por lernejoj infanoj. Nu, mi komencis kaj ne haltis, sed... daŭrigis, ĉar la ludo fariĝis obsedo pro la iluzio plupaŝi la vojon, kiun aliaj antaŭuloj jam ekiris. Kaj nun, dika staplo da maŝinskribitaj paperfolioj gardas, kiel frukton de intensa laborado, preskaŭ la duonon de kompleta traduko. Estas do konvene —mi kredas— prezenti jam al la konsidero kaj juĝo de la landa kaj eksterlanda esperantistaro iun specimennon de la atingitaj rezultatoj, por ke utilaj rimarkoj, oportunaj kritikoj, aŭ favoraj sugestoj, helpu min fari la necesajn riparojn en tio jam farita, por povi poste labori pli trankvile kaj sekure en ĉio, kio ankoraŭ —bedaŭrinde tro multe— restas por fari.

Mi zorgis traduki, kiel eble plej fidele, ĉiujn nuancojn de la originalo, penante konservi tiun subtilan parfumon, kiun eligas la antikvaj libroj, sed kun stilo klara, por ebligi facilan legadon eĉ al tiuj samideanoj, kiuj situas akster la areo de la hispana lingvo. Diri, ĉu modesta membro el la esperantista familio, kiel fakte mi estas, sukcesis aŭ malsukcesis en tiel aroga intenco, apartenas al vi, kara leganto, al kiu sincere mi dediĉas ĉi tiun specimennon, pri kies kvalito kaj aranĝo mi atendas vian opinion kun emocio kaj danko.

Nur kelkajn apartajn vortojn mi volas ankoraŭ diri, por speciale atentigi la legantojn pri la vortoj *Manĉujo* kaj *Don-Kiĥoto*; la originala vorto *Manĉa* estas nomo de hispana regiono, tial mi elektis en la traduko la formon *Manĉujo* kaj ne *Manĉa* aŭ *Manĉo*, kiuj ne tre klare donus sencon de teritorio. Pri la vorteto *Don*, antaŭ la nomo de l'heroo, estas diversaj opinioj, tamen ĝi estas nedisigebla karakteriza antaŭaĵo por la nomo *Kiĥoto* en kiu ajn lingvo. Mi provis en mia traduko rilatigi pli intime tiun vorteton al ĝia apartenanto per simpla streketo, tiel: *Don-Kiĥoto*. Neniel mi pretendas, ke per tio malaperis la problemo, sed multe mi ĝojos se, dank' al iniciato mia, en harmonia kunlaboro, trovas definitivan solvon, dun sia eterna vagado tra la mondo, la definitiva nomo, en Esperanto, de la Genia Kavaliro Don-Kiĥoto de Manĉujo.

Decembro 1949.

LUIS HERNANDEZ

Recaredo, n.º 22, 1.º - Valencia [Hispanio]

LA GRANDA HOMERO NE SKRIBIS LATINE,
ĈAR LI ESTIS GREKO, NEK VIRGILIO SKRIBIS
GREKE, ĈAR LI ESTIS LATINO

CERVANTES



ĈAPITRO XXIII

PRI LA LIBERO, KIUN DON-KIĤOTO DONIS AL MULTAJ MALFELIĈULOJ, KIUJN ONI MALVOLONTE PORTIS, KIEN ILI NE VOLUS IRI

Rakontas Cido Hameto Benengelo, arabida manĉujano kaj aŭtoro, en ĉi tiu plej grava, laŭtesona, preciza, dolĉa kaj sprita historio, ke tuj post kiam inter la tama Don-Kiĥoto de Manĉujo kaj Sanĉo Panzo, lia servisto, pasis tiuj paroloj, kiujn ĉe la fino de la dudek-unua ĉapitro oni skribis, Don-Kiĥoto levis la okulojn kaj vidis, ke sur la vojo, kiun li iris, venis piede ne pli ol dekdu viroj interkroĉitaj, kiel kalkuliloj, per granda fera kateno ĉirkaŭ la kolo; ĉiuj kun lignoj ĉe la manoj. Venis ankaŭ kun ili du viroj sur ĉevaloj, kaj du aliaj per la piedoj. La rajdantoj portis radetajn pafilojn, kaj la piedirantoj sagojn kaj glavojn; tuj, kiam ilin vidis, Sanĉo Panzo diris:

—Jen ĉeno da galeruloj, perfortitaj homoj de la Reĝo, kiuj iras al la galeroj.

—Ĉu perfortitaj homoj?, demandis Don-Kiĥoto, ĉu vere la Reĝo trudas torton al ju homo?

—Mi ne diris tion, respondis Sanĉo, sed nur, ke ili estas homoj, kiujn pro iliaj deliktoj oni kondamnis iri, per forto, servi al la Reĝo en la galeroj.

—En konkludo, rediris Don-Kiĥoto, kiel ajn oni studas la aferon, tiuj homoj, kvankam ili iras, perforte iras kaj ne volonte.

—Tute vere, diris Sanĉo.

—Nu, tial do, diris lia mastro, decas nun la praktikado de mia profesio: detruu la perfortaĵojn kaj helpu kaj atenti la mizerulojn.

—Atentu pli via moŝto, diris Sanĉo, ke la leĝo, kvazaŭ mem la Reĝo, ne faras perforton nek ofendon al tiuj homoj, sed ĝi punas ilin pro iliaj deliktoj.

Alvenis tiam la ĉeno da galeruloj; kaj Don-Kiĥoto, per tre afablaj paroloj, petis al la servantoj de ilia gardo, esti bonvolaj informi lin kaj diri lin pri la kaŭzo aŭ kaŭzoj, kial oni portas tiujn homojn laŭ tia maniero. Unu el la rajdantaj gardistoj respondis, ke temas pri galeruloj, homoj de Lia Majesto, kiuj iras al la galeroj; sekve, nenio plu dirinda kaj nenio plu sciinda.

—Tamen, rediris Don-Kiĥoto, mi volus scii, de ĉiu el ili aparte, la kaŭzon de ilia malfeliĉo; li aldonis al ĉi tiuj aliajn tiel diskretajn parolojn, por movi ilin diri, kion li deziris, ke la alia rajdanta gardisto diris:

—Kvankam ni portas ĉi-kune la registron kaj la ateston, kun la verdikto, de ĉiu el tiuj malbonsortuloj, ne estas tempo halti nun por montri kaj legi ĝin: venu mem via moŝto, demandu rekte al ili, kaj ili diros ĉion, se ili volas, kaj ili volos, ĉar ili estas homoj, kiuj trovas plaĉon farante kaj dirante friponaĵojn.

Kun ĉi tiu permeso, kiun Don-Kiĥoto prenis, se oni ĝin al li ne donus, li venis ĝis la ĉeno; kaj al la unua punato li demandis pro kiaj pekoj li situas sub tiel malbona ŝanco. Li respondis, ke pro enamiĝemo li troviĝas en tia maniero.

—Ĉu nur pro tio? rediris Don-Kiĥoto; ho, se pro enamiĝemo oni ĵetas en galerojn, multajn tagojn mi devus jam remadi tie!

—Ne temas pri amajoj el tiuj, kiujn via moŝto pensas, diris la galerulo, sed alia mia inklino, ĉar tiom multe mi amis lavkorbon plenŝtopitan per blankaj tolaĵoj, kaj tiel fervore mi ĝin brakumis, ke, se la gardistoj ne forprenus ĝin al mi per forto, ankoraŭ mi ne estus forlasinta ĝin volonte. Klara do la

fakto, ne estis neceso de torturo, fermiĝis la proceso, oni akomodis mian dorson per centaĝo, kun aldono de tri daŭroj⁽¹⁾ da gurapoj, kaj finiĝis la ludo.

—Kio estas gurapoj? demandis Don-Kiĥoto.

—Gurapoj estas galeroj, respondis la galerulo. Tiu estis junulo, en aĝo ĉirkaŭa al dudek-kvar jaroj, naskiĝdevena de Piedrahito, kiel li diris.

Same demandis Don-Kiĥoto al la dua, kiu ne respondis vorton, ĉar li statis tre malĝoje kaj melankolie; sed je lia nomo, respondis denove la unua, dirante:

—Ĉi tiu, sinjoro, malliberas pro tio, ke li fariĝis kanario; tio estas: kantisto kaj muzikisto.

—Ĉu vere? rediris Don-Kiĥoto, ĉu pro kanto kaj muziko ankaŭ oni iras al la galeroj?

—Jes, sinjoro, respondis la galerulo, ĉar ne pli domaĝa afero ol kanti en angero.

—Ofte, tamen, mi aŭdis diri, diris Don-Kiĥoto, ke per kanto kvietiĝas veanto.

—Ĉi tie, kontraŭe, diris la galerulo, kiu nur unu fojon kantas, tiu dum tuta la vivo ploras.

—Mi ne komprenas, diris Don-Kiĥoto.

Tiam, unu el la gardistoj diris:

—Sinjoro kavaliro, kanti en angoro signifas, en ĉiu medio *non sancta*, konfesi per torturo. Al tiu pekinto oni donis torturon; kaj li konfesis sian delikton, ke li estas kvarpiedisto, kio egalas je rabisto de ĉevaloj. Pro la konfeso, oni kondamnis lin al ses jaroj da galeroj, krom ducent vipobatoj, kiujn li jam portas sur la dorso; ĉiam li estas enpena kaj malgaja, ĉar la ceteraj rabistoj, kiuj tie restis aŭ ĉi tie apudas, lin insultas kaj ofendas kaj ĉikanas kaj malŝate konsideras tial, ke li konfesis kaj ne havis kuraĝon por respondi ne kaj ne; ĉar ili diras, ke tiom da literoj nombras la vorto *ne*, kiom la vorto *jes*,⁽²⁾ kaj ke sufiĉe da bonŝanco havas iu akuzito, kiam de sia lango dependas lia vivo aŭ lia morto, kaj ne de tiu de atestantoj aŭ pruvantoj; kaj mi kredas, ke en tio ili ne erare vojas.

—Ankaŭ tiel mi opinias, respondis Don-Kiĥoto.

Kaj sin turnante al la tria, li demandis same, kion al la aliaj. Vigle kaj tute senĝene, ĉi tiu respondis kaj diris:

—Mi iras por kvin jaroj al la sinjorinoj gurapoj, pro manko de dek dukatoj.

—Dudek mi donos tuj tre volonte, diris Don-Kiĥoto, por liberigi vin de tia domaĝo.

—Tio ŝajnas, respondis la galerulo, kvazaŭ oni havus monon en mezo de gollo, kaj oni tamen mortus pro malsato, sen eblo por aĉeti, kion oni bezonas. Mi parolas tiel, ĉar se mi estus havinta siatempe tiujn dudek dukatojn, kiujn via moŝto nun oferas, mi estus per ili ŝmirinta la plumon de la skribisto, kaj eĉ akriĝinta la ruzon de l'prokuroro, laŭ maniero, ke hodiaŭ mi troviĝus meze de la Zokodovera placo en Toledo, kaj ne sur ĉi tiu vojo, ligata kiel hundo; sed, granda estas Dio: pacienco kaj plu nenio!

Venis Don-Kiĥoto al la kvara, kiu estis viro kun respektinda vizaĝo kaj blanka barbo, pendanta preter lia brusto. Aŭdinte demandadi pri la kaŭzo, kial tie li troviĝas, li komencis plori kaj ne respondis vorton; sed la kvina punate prantis la langon kaj diris:

—Ĉi tiu honorinda viro iras por kvar jaroj al la galeroj; kaj unue li promeniĝis la ĝibon, en pompa kostumo sur ĉevalo.

—Tio signifas, diris Sanĉo Panzo, laŭ mia scio, paradi en honto.

—Jes, rediris la galerulo; kaj la kulpo, ke oni donis al li tiun punon, venas de tio, ke li makleris pri orolo kaj pri ĉia korpa ero. Efektive, mi volas diri, ke ĉi tiu civitano estas alkaŭedo,⁽³⁾ kun aparta ornamo de ringo kaj rango de sorĉisto.

(1) Jaroj. (Ĉi tiu noto, kaj la ceteraj, estas de la tradukinto.)

(2) En hispana lingvo, kompreneble.

(3) Peranto por obliĝi rilatojn inter viro kaj virino.

—Se ne pro aldono de tiuj ringo kaj rango, diris Don-Kifoto, sole nur kiel alkaŭedo, li ne meritas remadi en la galeroj, sed regadi tie, kiel ties generalo. Tute ne io ajn estas la ofico de alkaŭedo, ĉar ofico diskreta ĝi estas, treege necesa en ĉiu komunumo bone organizata, kiun devas praktiki nur personoj dece edukitaj, por kiuj devas ekzisti eĉ kontrolanto aŭ ekzamenanto, same kiel da ili ekzistas por la ceteraj oficoj, laŭ koncerna kaj publika matrikulo, kvazaŭ komercaj makleristoj. Tiel oni evitus multajn damaĝojn, kiuj okazas pro la fakto, ke tiu ofico kaj okupateco troviĝas inter malsaĝa personaro, kun malalta komprenemo, ekzemple: fivirinoj el tio kaj alio, lakeoj kaj friponetoj kun malmulte da aĝo kaj malmulte da sperto, al kiuj, en la plej grava momento, kiam estas necese agi per efika diligento, malvarmigas la supo, de la mano ĝis la buŝo, ĉar ili ne scias, kie estas ilia dekstra mano. Mi dezirus pludiri ankoraŭ kaj doni klarigojn, kial konvenas fari elekton pri tiuj, kiuj en la komunumo, devas plenumi tiel necesan oficon, sed ne estas nun oportuna la loko por tio; iam tiu sciis, kiu povos zorgi kaj decidi. Mi nur diras nun, ke la ĉagreno, kiun mi ricevis vidante tiujn blankajn harojn, kaj respektindan vizaĝon, sub tiom da malĝojo, pro alkaŭedeco, malaperis pro aldono de la sorĉisteco. Kvankam bone mi scias, ke en la mondo ne ekzistas sorĉo kapabla turni kaj tordi la volon, kiel kelkaj simpluloj kredas, ĉar libera estas nia volenteco; tute ne ekzistas herbo nek sorĉumo por ĝin devigi. Temas pri kelkaj miksajoj kaj venenoj, kiujn ordinare faras kelkaj virinoj simplaĉaj kaj kelkaj friponoj mensogemaj, per kio ili frenezigas la homojn celante pruvi, ke ili posedas povon estiĝi amon, malgraŭ tio, kiel dirite, ke afero neebila estas devigi la volon.

—Jes, tiel! diris la vea maljunulo; kaj vero estas, sinjoro, ke se pri la sorĉisteco mi ne kulpas, pri la alkaŭedeco nenion mi povas neadi. Sed, neniam mi pensis agi malbone per tio, ĉar mia sola intenco estis, ke ĉiuj povu amuziĝi kaj vivi en paco kaj kvieteco, sen kvereloj nek suferoj; sed tiu bona deziro taŭgis reneiel por liberigi min tri tien, de kie mi ne esperas reveni, pro la ŝarĝo de la jaroj kaj pro malsano de la urino, kiu lasas al mi nek momenton da ripozo. Kaj denove, li aliĝis al sia ploro, kiel antaŭe; eksentis Sanĉo tiom da kompato, ke li venis de la sino unu realon⁽¹⁾ el kvar onoj, kaj li ĝin donis al li, kiel almozon.

Pasis antaŭen Don-Kifoto kaj demandis al alia pri lia delikto; ĉi tiu demando respondis per ne malpli, sed multe pli, da arogo ol la antaŭa:

—Mi troviĝas nun ĉi tie, ĉar mi ŝercis tro kun du fratinoj, kuzinoj miaj, kaj kun aliaj du fratinoj, ne miaj; fine, tiom mi ŝercis kun ili ĉiuj, ke rezultis el la ŝerco tiel komplika kresko de la idaro, ke ne estas sumisto por ĝin kalkuli. Ĉio praviĝis, mankis favoro, monon mi ne havis, preskaŭ mi borderis la riskon perŭi la glutejon, oni min kondamnis al galeroj por ses jaroj. Nu, mi konsentis, puno ĝi estas al kulpo mia, ankoraŭ juna mi estas, vivu do la vivo! ĉar dank' al ĝi oni ĉion atingas. Se via moŝto, sinjoro kavaliro, havas ion per kio helpi ĉi tiujn mizeruletojn, Dio pagos al vi en la ĉielo, kaj ni klopodos en la tero peti al Dio, en niaj preĝoj, por la vivo kaj sano de via moŝto, ke ĝi estu tiel longa kaj tiel bona, kiel via bona aspekto meritas.

Tiu viro montriĝis en studenta kostumo, kaj unu el la gardistoj diris, ke li estas vigla babilomulo kaj lerta latinisto. Malantaŭ ĉiuj situis homo tre bonaspekta, laŭ tridekjara aĝo, kiu tamen ĉe rigardado direktis unu okulon en la alian. Li venis malsame ligata ol la ceteraj, ĉar li portis ĉe la piedo tiel grandan katenon, ke ĝi lin volvis tra la tuta korpo; krom du ringejoj ĉe la kolo: unu por la kateno, kaj la alia el tiuj nomataj gardo-amiko⁽²⁾ aŭ piedo-amiko, de kiu deĝis du feraĵoj ĝis la talio, al kiuj kroĉiĝis du manligiloj, fermitaj per dika seruro, kie li portis la manojn laŭ maniero, ke nek per la manoj li povis atingi la buŝon, nek li povis klini la kapon ĝis situo de la manoj. Don-Kifoto

(1) Antikva hispana arĝenta monereto.

(2) Speco de dubranĉa hoko, kiun tiutempe oni metis sub la mentono al iaj punatoj, por devigi ilin teni la kapon altan.

demandis, kial tiu viro portas tiom pli da malliberigiloj ol la aliaj. La gardisto respondis, ke tiu viro sola faris pli da punindaĵoj, ol ĉiuj aliaj kune, kaj ke li estas tiel malrespekta ulo kaj tiel granda fripono, ke kvankam oni portas lin tiamaniere, ankaŭ oni malfidas je li pro la timo, ĉu li forkuros.

—Kiajn punindaĵojn do li faris, diris Don-Kihoto, ke ili ne meritas pli da puno ol tiu remadi en la galeroj?

—Li iras por dek jaroj, rediris la gardisto, kio egalas al socia morto. Sufiĉas nur scii, ke ĉi tiu bona homo estas la fama Gineo de Pasamonto, kiun per alia nomo oni nomas Gineĉjo de Parapelo.

—Sinjoro komisaro, diris tiam la galerulo, parolu vi iom post iom, kaj oni ne ludu ja per nomoj kaj ainomoj: Gineo mi nomiĝas kaj ne Gineĉjo, Pasamonto estas mia titolo kaj ne Parapelo, kiel vi diras, kaj ĉiuj sin observu ĉirkaŭen, kio ne estos malmulte...

—Parolu vi malpli emfaze, rediris la komisaro, sinjoro rabisto el supera marko, se vi ne volas, ke mi vin silentigu, spite al via plaĉo.

—Vero estas, respondis la galerulo, ke la homo rolas, kiel Dio volas; sed tago venos, kiam ĉiuj scios, ĉu mi nomiĝas aŭ ne nomiĝas Gineĉjo de Parapelo.

—Ĉu oni ne tiel vin nomas, mensogulo? diris la gardisto.

—Jes, tiel, respondis Gineo; sed mi zorgos por ke jam ne plu, aŭ ion mi eltondos tie, kie mi diras interdente. Sinjoro kavaliro, se iom vi volas doni, donu jam kaj foriru kun Dio, ĉar vi jam komencas ĝeni pro via obstino voli sciadi pri alies vivoj. Nu, se pri la mia vi volas scii, sciu ke mi estas Gineo de Pasamonto, kies vivo estas skribita de ĉi tiuj fingroj.

—Tute vere, diris la komisaro, ĉar li mem verkis sian historion, kiu neniel plu; tie, en la malliberejo, restis la libro sub lombardo je ducent realoj.

—Kaj mi ĝin reprenos, diris Gineo, eĉ se je ducent dukatoj.

—Ĉu tiel bona ĝi estas? diris Don-Kihoto.

—Jes, tiel bona, respondis Gineo, ke malbona la ŝanco por *Lazareĉjo de Tormeso*⁽¹⁾ aŭ por ĉiuj, kiujn el tia speco oni skribis aŭ oni skribos. Nun al via moŝto mi povas nur diri, ke ĝi rakontas verojn; kaj tiel belaj, kaj tiel amuzaj, estas tiuj veroj, ke ne povas ekzisti malveroj egalaj al ili.

—Kia estas la titolo de la libro? demandis Don-Kihoto.

—*La Vivo de Gineo de Pasamonto*, respondis li mem.

—Ĉu jam finita? demandis Don-Kihoto.

—Kiel ĝi povas esti finita, respondis Gineo, se ankoraŭ ne estas finita mia vivo? Tio, kion mi skribis, sekvas ekde mia naskiĝo ĝis la momento, kiam ĉi-foje oni repuŝas min denove en la galerojn.

—Ĉu alian fojon, do, vi sidis tie? diris Don-Kihoto.

—Je la servo de Dio kaj la Reĝo, alian fojon, dum kvar jaroj; tial, mi jam scias je kio gustas la biskvito kaj la skurĝo, respondis Gineo; tamen, reiri tien ne multe pezas, ĉar tie mi havos okazon por fini la libron, al kiu mankas multaj aferoj ankoraŭ rakontindaj; kaj en la galeroj de Hispanio regas pli da kvieteco ol oni bezonas, kvankam multe pli mi ne bezonos por tio, kion mi skribos, ĉar mi scias ĝin parkere.

—Tre lerta vi estas, diris Don-Kihoto.

—Kaj tre malfeliĉa, respondis Gineo, ĉar kutime la malfeliĉoj persekutas la grandajn talentojn.

—Kaj la friponojn! diris la komisaro.

—Mi jam diris, sinjoro komisaro, respondis Pasamonto, ke vi parolu iom post iom; ĉar rajtigitaj sinjoroj ne donis al vi tiun vergon por ofendi la mizerulojn, kiuj ĉi tie kunvenas, sed nur por nin gvidi kaj porti, kien Lia Majesto ordonas. Se ne, pro vivo de..., sufiĉe! ĉar povas okazi, ke aperos en la lavejo la makuloj de la vendejo; kaj ĉiuj silentu, kaj ĉiuj vivu bone, kaj ĉiuj parolu eĉ ankoraŭ pli bone, kaj ni ekmarŝu; ĉar ja troa ĉikano estas ĉi tio.

(1) Titolo de libro, tre populara tiutempe, kun la nomo de knabo, kiu gvidadis blindulen tra urbeto nomata Tormeso.

La komisaro levis alten la vergon por trafi Pasamonton, kiel respondo al liaj minacoj ; sed Don-Kihoto metis sin intere, kun la peto ne bati lin ; ĉar ne troe, se tiu portanta tiel malliberaj la manojn havas iomete libera la langon. Kaj, sin turnante al ĉiuj el la katenoj, li diris :

—El ĉio, kion vi diris, karegaj fratoj, mi tiras la konkludon, ke, kvankam oni punis vin pro viaj kulpoj, la punoj, kiujn vi suferos ne havigos al vi multe da ĝuo ; tial vi iras al ili tre malplaĉe kaj treege malvolonte. Verŝajne, la malmulta kuraĝo, kiun montris iu en la torturo, la malmulta mono de unu, la malmulta favoro ĉe alia, kaj fine la malmulta saĝo de l' ĵuĝisto, estis la kaŭzo de via malfeliĉo kaj de via malsukceso en la justeco, kiu ĉe via flanko sidis. Ĉio ĉi tio, kune, sin prezentas al mi en la memoro admonante, persvadante kaj eĉ devigante min montri, antaŭ vi, la efikon por kiu la ĉielo portis min en la mondon por eniri en la ordenon de kavaliroco, kiun mi profesias, laŭ la sankta promeso farita helpi la bezonantojn kaj ĉiujn subprematojn de superuloj. Sciante, tamen, ke parto de la prudento avertas, ke tion oni ne akiru per malbono, kion per bono akiri oni povas, mi volas peti al ĉi tiuj sinjoroj, komisaro kaj gardistoj, estu komplezaj malligi vin kaj lasi vin aliri en paco ; kaj aliaj ne mankos, kiuj servos al la Reĝo sub pli bonaj kondiĉoj, ĉar ŝajnas al mi malmilda ago fari sklavojn el tiuj, kiujn Dio kaj la naturo liberaj faris. Tion pli, sinjoroj gardistoj, rediris Don-Kihoto, ke ĉi tiuj mizeruloj nenion plenumis rekte kontraŭ vi ; ĉiu el ili jen ŝarĝu sin per sia peko ! ĉar Dio ekzistas en la ĉielo, kiu neglektas nek puni la malbonulojn nek premi la bonulojn ; tial, ne decas, ke honestaj homoj estu suferigantoj de aliaj homoj, se nenio en tio ilin koncernas. Tion mi petas humile kaj tipeze, por havi al vi iom da danko, se tion vi plenumas. Kaj, en la okazo ne obei min volonte, ĉi tiu lanco kaj ĉi tiu glavu, per la forto de mia brako, vin devigos obei malvolonte.

—Tro ridiga sensencaĵo ! respondis la komisaro. Jen per kia ruzo finiĝas la amuzo ! Ke ni allasu la punatojn de la Reĝo, kvazaŭ ni havus aŭtoritaton por liberigi ilin, aŭ li havus rajton por tion ordoni ! Iru via moŝto, sinjoro, bonhore viajn vojojn kaj ordigu pli la paton, kiun vi portas sur la kapo, kaj ne ludu serĉante tri piedojn al la kato. (1)

—Vi mem estas la kato, la rato kaj la pato ! respondis Don-Kihoto. Kaj tiel parolante, tuj agante, li ekatakis lin tiel rapide, ke, sen doni eblon por taŭga defendo, li renversis lin sur la plankon, funde vundita de lancobato ; kaj ĉio okazis oportune, ĉar la falinto portis pafilon.

La ceteraj gardistoj restis konfuzaj kaj perpleksaj, antaŭ la neatendita okazaĵo ; sed, reaktivante konscion, la rajdantoj metis manon al siaj glavoj, kaj la piedirantoj al siaj saĝoj, kaj ĉiuj tuj ekatakis Don-Kihoton, kiu ilin atendadis tute trankvile. Tamen, li lartus malbone se ne pro la galeruloj, kiuj, vidante la ŝancon—al ili venanta—povi atingi la liberon, klopodis tiucele, klopodante rompi la katenon per kiu ili estis kunligataj.

Okazis la konflikto laŭ maniero, ke la gardistoj, jen por atenti la galerulojn, kiuj sin malligis, jen por ataki Don-Kihoton, kiu forte atakis, faris nenion utilan. Helpis Sanĉo siaflanke en la malligado de Gineo de Pasamonto, kiu estis la unua ekpaŝi en la arenon libere kaj senembarase. Kaj, ĵetinte sin sur la falintan komisaron, li forprenis lian glavon kaj lian pafilon ; pro kio, kvankam li celis ien, direktis tien kaj pafis neniel, neniu gardisto restis sur la kampo, ĉar ili rapide forkuris, tiel same de la pafilo de Pasamonto, kiel de la multaj ŝtonoj, kiujn la ĵus malligitaj galeruloj al ili ĵetadis. Multe afiktigis Sanĉo pro la okazaĵo, ĉar li prezentis al si, ke la forkurintoj ne pre sciigos la aferon al la Sankta Hermandado, (2) kiu, per veanta sonorilo, ekiros serĉi la deliktintojn. Tiusence li parolis al sia mastro, petante lin foriri baldaŭ kaj embuskiĝi en la montaro, kiu proksime troviĝas.

—Tre bone, diris Don-Kihoto, sed mi scias, kion oni devas unue fari. Kaj,

(1) Hispana esprimo: serĉi senkaŭze motivojn por kverelo.

(2) Grava tiutempa institucio por persekuti kaj puni malbonfarantojn, precipe tiujn, kiuj malbone agis tra la kamparo.

vokante ĉiujn galerulojn, kiuj ĝojbrue senvestigis la komisaron, ĝis li restis sola kun la haŭto, ili ĉiuj ariĝis ĉirkaŭe por scii, kion li ordonas; kaj tiel li parolis:

—Danki la favorojn, kiujn oni ricevas, estas pruvo de inda naskiteco; sekve, unu el la pekoj, kiuj plej multe Dion ofendas, estas tiu de la sendankemo. Mi diras tion, ĉar vi jam vidis, sinjoroj, per klara sperto, la favoron, kiun ĵus vi ricevis; por iel ĝin pagi, mi deziras —kaj tio estas mia volo— ke, ŝargataj per tiu kateno, kiun mi forigis de viaj koloj, tuj ekmarŝu vi survoje, kaj ekiru ĝis la urbo Toboso, kie vi devas vin prezenti antaŭ la sinjorino Dulcinea, dirante al ŝi, ke ŝia kavaliro, la kavaliro de la Malgaja Figuro, al ŝi sin ofertas; rakontu punkton post punkto ĉiujn punktojn, kiuj svarmis en ĉi tiu fama aventuro, ĝis mi redonis al vi la sopiratan liberon. Post tio, vi povos jam iri, kien ajn vi volos, laŭ via bona sorto.

Je nomo de ĉiuj, respondis Gineo de Pasamonto dirante:

—Efektivigi tion, kion via moŝto ordonas, sinjoro kaj liberiganto nia, estas neeble en plena neebleco; ĉar neniel ni povos marŝi kune tra la vojoj, sed nur izole kaj dise, ĉiu laŭ sia zorgo, penante sin kaŝi eĉ en la teron, por eviti renkonton kun la Sankta Hermandado, kiu, ekster ĉia dubo, nepre venos nin serĉi. Sangŭ via moŝto, do, kaj tio estos juste, tiun servon kaj imposton por la sinjorino Dulcinea de Toboso, en ian kvanton da kredoj kaj anĝelusoj, kiujn ni preĝos en intenco pri via moŝto; kaj ĉi tio estas tasko, kiun plenumi oni povas dum nokto aŭ dum tago, kurante aŭ ripozante, en paco aŭ en milito; sed la ideo, ke ni devas reveni al la kaldronoj de Egipto, t. e.: repreni nian katenon kaj ekiri la vojon al Toboso, egalas al la ideo, ke nun estas nokte, kvankam ankoraŭ ne estas la deka matene; kaj same estas peti al ni tion, kiel peti pirojn al ulmo.

—Ha, fi al vi! diris Don-Kihoto brulanta jam en kolero, Don-Filo de Ciesalino, Don-Gineĵo de Parapele, aŭ kiel ajn vi nomigas; sciu, ke sola tien vi iras, kun la vosto inter la kruroj kaj la kateno sur la ŝultroj.

Pasamonto, ne tro multe eltenema, sciante jam, ke Don-Kihoto ne statas saĝe, pro la efektivigita frenezaĵo voli doni liberon al ili, kaj vidante sin trakti laŭ tia maniero, grimacis per la okuloj al siaj kamaradoj, kiuj aparte algruپیĝis kaj komencis pluvigi tiom da ŝtonoj sur Don-Kihoton, ke li ne havis sufiĉe da manoj, por kovri sin per la ŝildo; la malfeliĉa Rocinanto ne atentis pli la spronon ol se ĝi estus farita el bronzo. Sanĉo rifuĝis malantaŭ sia azeno, per kiu li sin defendis je la nubo da hajlo, kiu sur ambaŭ pluvadis. Ne tiel bone povis sin ŝirmi Don-Kihoto, kiun trafis ĉe la korpo tiom da ŝtonoj, per tiom da forto, ke ili renversis lin teren; tuj, apenaŭ li falis, venis al li la studento kaj deprenis la vazeon⁽¹⁾ de lia kapo, kaj donis per ĝi tri aŭ kvar frapojn sur la dorson, kaj pliajn aliajn sur la plankon, post kio li preskaŭ igis ĝin en pecojn. Oni forprenis kamizolon, kiun li portis sur la armaĵo, kaj eĉ la ŝtrumpojn oni forprenis, se la krurarmaĵo ne malhelpus. Al Sanĉo oni forprenis la surtuton, lasinte lin en subvesto; kaj, distribuinte inter si la ceterajn akiraĵojn de la batalo, ili foriris, ĉiu laŭ sia flanko, kun pli da zorgo forkuri de la Sankta Hermandado, kiun ili timis, ol ŝargi sin per la kateno kaj ekiri sin prezenti antaŭ la sinjorino Dulcinea de Toboso. Restis solaj denove la azeno kaj Rocinanto, Sanĉo kaj Don-Kihoto; la azeno, kapklina kaj enpensa skue-tante de tempo al tempo la orelojn, pensante ĉu ankoraŭ ne ĉesis la uragano da ŝtonoj, kiuj forte persekutis ĝiajn aŭdilojn; Rocinanto, kuŝanta apud sia mastro, ĉar ankaŭ ĝi falis pro efiko de alia ŝtono; Sanĉo, en subvesto kaj timoplena je la Sankta Hermandado; kaj Don-Kihoto, treege malĝoja vidante sin tiel ĉagrena, fare de la samaj homoj, al kiuj tiom da bono li faris.



(1) Barbira vazo, kiun Don-Kihoto portis, kiel kaskon, kaj pri kiu mokis la komisaro.